



2(147)  
2014

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Julian Tuwim

## O panu Tralalińskim

W Śpiewowicach, pięknym mieście,  
Na ulicy Wesolińskiej  
Mieszka sobie słynny śpiewak,  
Pan Tralislaw Tralaliński.  
Jego żona – Tralalona,  
Jego córka – Tralalurka,  
Jego synek – Tralalinek,  
Jego piesek – Tralalesek.  
No a kotek? Jest i kotek,  
Kotek zwie się Tralalotek.  
Oprócz tego jest papużka,  
Bardzo śmieszna Tralalużka.

Co dzień rano, po śniadaniu,  
Zbiera się to zacne grono,  
By powtórzyć na cześć mistrza  
Jego piosnkę ulubioną.  
Gdy podniesie pan Tralislaw  
Swą pałeczkę – tralaleczkę,  
Wszyscy milkną, a po chwili  
Śpiewa cały chór pioseneczkę:  
„Trala trala tralalala  
Tralalala trala trala!”  
Tak to pana Tralislawa  
Jego świetny chór wychwala.  
Wyśpiewują, tralalują,  
A sam mistrz batutę ujął  
I sam w śpiewie się rozpala:  
„Trala trala trala la la!”

I już z kuchni i z garażu  
Słysząc pieśń o gospodarzu,  
Już śpiewają domownicy  
I przechodnie na ulicy:

## Pri sinjoro Kanzonulo

En la urbo Ĝojkantejo,  
Ĉe la stratoj de Gajuloj  
Loĝis iam fama majstro,  
Tralislao Kanzonulo.  
Kun Edzino – Tralalino,  
Filineto – Tralaleto,  
Kaj la filo – Tralalilo  
Kun la hundo – Tralalundo  
Kaj kun kato, estis kato,  
Havis nomon Tralalato.  
Ankaŭ estis la papago,  
Tre ridinda – Tralalago.

Ĉiutage, frumatene,  
Kunvenadis en salono  
Proksimuloj kaj por majstro  
Ili kantis la kanzonon.  
Se jam levis Tralislao  
Sian trala-bastoneton  
Ĉiuj pretas por komenci  
Koruse lian kanteton:  
„Trala trala tralalala  
Tralalala trala trala!”  
Tiel laŭdis Tralislao  
Lia lertaganta ĥoro.  
Ili kantis, tralaladis,  
Majstro mem taktilon kaptis  
Ankaŭ kantis kun fervoro  
„Trala trala trala lo lo!”

Kaj en tuta jam loĝejo,  
En banĉambro, kuirejo,  
En ĝardeno, ĉe la domo,  
Eĉ sur strato kantis homoj:

Ŝpiewa ŝofer – Tralalofer  
I kucharka – Tralalarka,  
Pokojówka – Tralalówka  
I gazeciarz – Tralaleciarz,  
I sklepikarz – Tralalikarz,  
I policjant – Tralalicjant,  
I adwokat – Tralalokat,  
I pan doktor – Tralaloktor,  
Nawet mała myszka,  
Szara Tralaliszka,  
Choć się boi kotka,  
Kotka Tralalotka,  
Siadła sobie w kątku,  
W ciemnym tralalątku  
I też piszczy cichuteńko:  
„Trala trala tralaleńko...”

La ŝoforo – Tralaloro  
Kuiristo – Tralalisto,  
Ĉambristino – Tralanino,  
Haviganto – Tralalanto,  
Kaj komizo – Tralalizo  
Policano – Tralalano  
Advokato – Tralalato,  
Kaj kirurgo – Tralalurgo  
Eĉ malgranda muso,  
Griza Tralaluso  
Malgraŭ tim’ pro l’ kato,  
Kato Tralalato  
Sidis en angulo  
Morna tralalulo,  
Ankaŭ time ĝi pepetis:  
„Trala trala tralaleti...”

## Abecadło

Abecadło z pieca spadło,  
O ziemię się hukło,  
Rozsypało się po kątach,  
Strasznie się potłukło:  
I – zgubiło kropeczkę,  
H – złamało kładeczkę,  
B – zbiło sobie brzuszki,  
A – zwichnęło nóżki,  
O – jak balon pękło,  
aź się P przelekło.  
T – daszek zgubiło,  
L – do U wskoczyło,  
S – się wyprostowało,  
R – prawą nogę złamało,  
W – stanęło do góry dnem  
i udaje, że jest M.

## Aboco

Falis foje el forneto  
Kaj en plankon batis  
La kompleta alfabeto,  
Ege sin frakasis.  
I – perdis punkteton,  
Ho – rompis ponteton,  
al Bo – ventr’ fleksiĝis,  
al A – krur’ tordiĝis.  
O – subite krevis,  
ĝis No timi devis.  
Lo en U lokiĝis,  
So – preskaŭ rektiĝis,  
To – disrompis breton,  
E – perdis stangeton,  
Piedon frakasis Ro  
kaj aspektas kvazaŭ Po.

tradukis *Urszula Tupajka*

## Diplomitoj de Jagelona Universitato agas plu

La jubileaj solenaĵoj de la Jagelona Universitato-Fondaĵo estas ecoj ne nur de nia grandioza altlernejo. Ĉiuj kaj mezepokaj kaj fonditaj poste universitatoj celebras siajn plenajn datrevenojn, volante substreki siajn historion kaj tradiciojn. Ankaŭ valoras ilia signifo por la nuntempa akademia socio. Plimulton da plej malnovaj universitatoj ampleksis iam kaj nune la gloro de altlernejoj la plej bonaj kaj plej famaj. Al ili apartenas Sorbona en Francio, Oksford kaj Cambridge en Anglio, itala Bolonia, Universitato de Karlo en ĉeĥa Prago, Heidelberg en Germanio kaj fondita en la j. 1636 Universitato de Harvard en Cambridge Massachusetts (Usono). La Jagelona Universitato konfirmas ĉi regulon. Ĝi estas la plej malnova kaj samtempe laŭ nuntempaj kontrol-esploroj la plej bona altlernejo en Pollando. Tradicio en nia universitato estas grandioze

subtenata kaj oni povas kuraĝe skribi, ke la nobeleco obligas. Ja reĝo Sigismundo la Olda donis la nobelecajn rajtojn al profesoroj, kiuj tralaboris en Krakova Akademio almenaŭ 20 jarojn.

La jubileaj solenaĵoj aranĝataj de universitatoj estas ne nur la festado kaj la orgojla gloro, sed antaŭ ĉio oni sumigas ĝisnunajn atingojn. Oni profundigas ankaŭ la refleksion super nuna stato de altlernejo kaj planas ĝian disvolviĝon.

La lastaj jubileaj solenaĵoj de Jagelona Universitato fruktis per multaj disertacioj pri historio de la krakova Almae Matris. Antaŭ ĉio ili ankaŭ kontribuis al disvolviĝo de infrastrukturo kaj firmigo de pozicio en la sciencaj esploroj. La jubileo de 600-a datreveno de la fondaĵo festita en 1964 j. fortigis en la socia konscio signifon de scienco kaj pozicon de Krakovo kiel la universitata urbo.

Krakovaj geesperantistoj, plejparte diplomitoj de Jagelona Universitato kaj krakovanoj laŭ la propra elekto sentas fortan ligan kun ĉi altlernejo, do emas kontribui en la ĉi jara jubileo, 650-a datreveno de ĝia fondigo.

Laŭ nia opinio la plej bona kontribuo al ĉi grava solenaĵo estos organizi aranĝon dum kiu la aŭtoroj de la prelegoj montros, ke scipovas kontinui scion transdonitan al ili de la fama altlernejo. Ni strebos, ĉiu enkadre de la propraj interesiĝoj, substreki ligojn temajn kaj personajn kun la Jagelona Universitato kaj Krakovo.

La plej proksima okazo por realigi niajn planojn estos XXVIII-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, kiujn ni aranĝos ĉi-jare, 30-a, 31-a de majo kaj 1-a de junio en Kulturdomo „Podgórze”, ĉe Sokolska-str. n-ro 13. Ni antaŭvidas konsideri famajn krakovanojn, kiel ekz. Wisława Szymborska, Odo Bujwid, Zenon Klemensiewicz, Mieczysław Sygnarski kaj Mordechaj Gebirtig. Krom prelegoj kaj komunikaĵoj ankaŭ la arta programo, du koncertoj, ligiĝos kun niaj intencoj.

Ĉiujn esperantistojn kaj simpatiantojn ni elkore invitas partopreni en nia aranĝo.

Estraro de Krakova Societo ESPERANTO

## **Dek devoj de esperantisto**

1. Bone sciu la lingvon, traktu ĝin kun respekto kaj lasu la versfaradon al la poetoj.
2. Esperanton uzu parolante, studu leganie kaj ne fuŝu skribante.
3. La plibonigistoj diskutu: vi Fundamenton sekvu kaj fidela restu.
4. Informadu ĉiam, ne ĉie; klarigu, ne prediku; akontu faktojn, ne esperojn.
5. Kion vi povas lerni nur en unu semajno, ne instruu en unu horo; el malgravaĵoj ne faru regulon, kaj el regulo ne faru malgravaĵojn.
6. Verkante en Esperanto ne kedu interesa, kion nacilingve neniu legus; ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron; ne malesperu se mankas aĉetantoj.
7. Al grupo alitu; la kunvenon vizitu; Esperanton parolu.
8. Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado. Memoru, ke tial internacia organizacio estas necesa; senlace varbu por ĝi.
9. Legu gazeton, por ke vi konu novajn faktojn; abonu, por ke ĝi povu ekzisti. Kunlaboru, por ke ĝi estu interesa.
10. Por Esperanto kiel movado agu; por ĝi kiel realaĵo pagu; kaj kiel altan idealo konservu ĝin en via koro.

el revuo „Frateco” n-ro 103, laŭ SP

## Oraj pensoj de certaj elstaruloj

1. Taverno – loko kien ĉiavespere oni iras lastfoje.
2. Tri pensoj de hundeto Fafik:
  - I. Homoj estas tristaj ĉar ili havas nenion por vostumi.
  - II. La homo iradas per du gamboj ĉar devas senĉese servi.
  - III. La homo forigis voston sed ne dekutimiĝis vostumi per ĝi.
3. Kiam hundo manĝas, tiam ne bojas. (*El saĝo popola*)
4. Ĉio kion mi ŝatas estas aŭ nelaŭleĝa aŭ senmorala aŭ de tio oni grasiĝas. (*Krecia Pataczkówna*)
5. Dio! Faru min honesta homo, sed tamen ne faru min honesta virino. (*Ninon de Lenclos*)
6. Vera amo estas kiel spiritoj, ĉiuj pri ili parolas, sed neniu ilin vidis. (*Magdalena Samozwaniec*)
7. Malhelaj fenestroj estas ofte sufiĉe hela atesto. (*Magdalena Samozwaniec*)
8. Post bona tagmanĝo oni povas pardoni al ĉiuj, eĉ al propraj parencoj. (*Oskar Wilde*)
9. Dio! Benu tiujn, kiuj vizitadas kunulojn, sed faras tion rare kaj mallonge.
10. Ĉiam al ni sufiĉas da forto por elteni fremdajn malfeliĉojn. (*La Rochefoucauld*)
11. Geolduloj ŝatas doni bonajn konsilojn, ĉar ili ne povas jam doni malbonajn ekzemplojn. (*La Rochefoucauld*)
12. Amo al patrujo ne konas limojn – fremdajn. (*Stanisław Jerzy Lec*)
13. Ne ĉiu palmo de prioritato naskas kokosfruktojn. (*Stanisław Jerzy Lec*)
14. La plej sanga tragedio – sango superverŝas spektantojn. (*Stanisław Jerzy Lec*)
15. Piroj sur saliko estas stultaĵo, tamen ekzistas laŭroj sur tilio\*. (*Stanisław Jerzy Lec*)  
\* *tilio pollingve – aĵo aŭ faro falsa, fuŝita, trompa*
16. Vivi estas malsane, ĉar kiu vivas tiu mortas. (*Stanisław Jerzy Lec*)
17. Se vi imagas, ke troviĝas surfunde, ĉiam ankoraŭ iu skrapas de sube. (*Stanisław Jerzy Lec*)
18. La vera virto ne timas kritikojn, sed ilin ne ŝatas. (*Stanisław Jerzy Lec*)
19. La kontraŭtima sonorilo devas havi bravan koron. (*Stanisław Jerzy Lec*)
20. Se vi eĉ donus kakaon al bovino, vi ne melkos ĉokoladon. (*Stanisław Jerzy Lec*)
21. Martireco estas unusola metodo, por sen talentoj resti fama. (*Oskar Wilde*)
22. La vera malamiko neniam vin lasos.
23. Sango nenion kostas, por vino oni devas pagi. (*Napoleono*)
24. Kiam vespere ni kalkulas ŝafojn, tiam ni tuj rememorigas al ni favajn ŝafinojn.
25. En vivo okazas du tragedioj – ne akiri ion deziritan kaj deziri tion akiritan.
26. Ne estas granda arto akiri ion deziratan, vera arto estas deziri ion akiritan.
27. Ne ĵetu al mi la ganton, ĉar estos al vi malvarme. (*Karol Irzykowski*)
28. La interparolo de sciencistoj: ili reciproke trafolumadis slipetojn en la kapoj. (*Karol Irzykowski*)
29. Ekzistas lamaj tabloj de la konvinkoj sub kiuj oni volonte submetas Biblion. (*Karol Irzykowski*)
30. Ĉe tiu stultulo oni havas impreson esti pli stulta ol li. (*Martin du Gard*)
31. Al parolemuloj por primediti: estas vero, ke komence estis Vorto. Sed – nur unu! (*U. Zybura*)
32. Ju pli neinteligenta reganto, des pli akra reĝimo. (*Urszula Zybura*)
33. Homoj estas kiel floroj – kelkaj miliardoj de Narcisoj. (*Urszula Zybura*)
34. Kiu plenumos tri dezirojn de la Ora Fiŝeto? (*Urszula Zybura*)

elektis kaj tradukis *Marta Michałowska*

## Krakova Societo ESPERANTO

### La programo de la renkontoj februare 2014 j.

6. 02. – Lidia Ligeza. **El spertoj de la esparanta tradukanto**
13. 02. – Andrzej Feuer. **Mnemoteknikaj versaĵetoj**
20. 02. – Marta Michałowska. **Esperantaj spritaĵoj**
27. 02. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**